

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## Nokte

*tradukita de Cezar*

Mi migras tra la noktkviet',  
 Ŝteliras ofte en sekret'  
 jen Lun' el nigra nubkovrilo.  
 Kaj tie, ĉie en la val'  
 Vekiĝas najtingal',  
 Kaj poste reas griz', trankvilo.

Ho vi mirinda noktkantad':  
 El for' tra l' land' riverplaŭdad'.  
 Sub nigraj arboj eĉ trem-plonĝo  
 Konfuzas pensojn ĝi.  
 Freneze kantas mi,  
 Jen kvazaŭ voko nur el songo.

*Traduko de la Germana poemo "Nachts" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de CEZAR (civila nomo: Hans-Georg Kaiser, \*1954-05-21).*

*Arg-1069-2158 (2014-06-27 22:00:11)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://cezartradukoj.blogspot.de/2022/12/josefo-de-eichendorff-kristnasko.html#!/2013/06/josefo-de-eichendorff-nokte-rimpoemo.html>.*